

### *Lingva justeco en praktiko: latinamerikaj spertoj kaj tendencoj*

La 47-a konferenco de ILEI celebros la 60-jariĝon de la unua rezolucio de Unesko pri Esperanto. En la lumo de la strategia plano de UEA kaj ĝia ĉefmotivo, *la lingva justeco*, ILEI prikonsideros la principan gravecon de ambaŭ uneskaj rezolucioj pri Esperanto, el Montevideo, 1954, kaj Sofio, 1985, kaj iliajn praktikajn utilojn kaj utiligojn por la E-movadaj celoj kun precipa atento pri la spertoj kaj tendencoj en Latinameriko kiel gastiganto de la Konferenco kaj UK en la jubilea jaro. Du urugvajaj ministerioj kaj aliaj institucioj oficiale deklaris sian apogon al la Konferenco.

### **Konferencjo kaj hoteloj**

La konferenco okazos en moderne ekipitaj salonoj de la belega konstruaĵo de *Ateneo*, en la urbocentro. *Ateneo* estas longtradicia urugvajja kultura institucio fondita en la jaro 1886, do preskaŭ samaĝulo de Esperanto. Ĝia laŭstatuta celo estas, koncizigite: „servi, en la etoso de absoluta spirita libero, al evoluigo de kulturo, promocii ĝian disvastigadon per libera diskuto pri ĉiuj principoj kaj tendencoj, kaj kontribui al defendo de ĝiaj principoj per ĉiuj legitimaj rimedoj servantaj al la vero kaj justeco” – jen tute adekvata okazejo kaj idea kadro por niaj diskutoj.

En promendistanca ĉirkaŭaĵo de la konferencejo troviĝas pluraj favorprezaj restoracioj, hosteloj kaj hoteloj ofertantaj ĉambrojn kun matenmanĝo, sendrata interreto kaj aliaj komfortaĵoj. Pliaj detaloj por loĝ- kaj manĝmendoj estos publikigitaj en la retejo de ILEI kaj alimaniere.

### **Programskemo, ekskursoj kaj transporto al UK**

La akcepto kaj loĝigo okazos sabaton posttagmeze, la 19-an de julio. La programo inkluzivos klerigajn erojn, laborkunsidojn, diskutsesiojn, lingvan festivalon, simpozion pri la konferenca temo, ekskursojn kaj vesperan distran programon. Viaj kontribuproponoj estos bonvenaj.

Urugvajo proponas abundon da historiaj, kulturaj kaj geografiaj vidindaĵoj kiel konferencajn ekskurscelojn, ekzemple: vidindaĵoj de *Montevideo* mem, *Punta del Este*, *Colonia del Sacramento*, *Durazno* k.c. kun farmbienoj, vinejoj, muzeoj, bestoĝardeno... Fine de la konferenco, vendrede la 25-an de julio, estos organizita kelkhora transporto al UK per buso kaj / aŭ ŝipo.

*Radojica PETROVIĆ, estrarano pri konferencoj*